

La bela kaj la bestio

Bestio li estas. Bestio. Ne eblas nek indas priskribi alie. Li konstante min plankenĵetas kaj krude piedbatas. Kun elano. Mi ruliĝas dolore. Hipokrita li estas ankaŭ: li foje min prenas ambaŭmane, kisas, kvazaŭ ame – sed min denove sternas por pli sovaĝe frapi. Mia korpo kontuziĝas de l' draŝado, sed li ignoras. Eĉ mia ronda ventro ne detenas lin: li fajfas pri la sekvoj. Tretas ventron, dorson, flankojn – ĉie. Kia homo faras tion!?! Kian sadisman ĝuon li ĉerpas!?! Infera vivo. Eterna mizero, neeltenebla, neeskapebla...

Ĉu tio estas la kalvario de mistraktata virino?

Aŭ la ĉiusemajna brutalajo kontraŭ futbalpilko?

Decidu.

La bela kaj la bestio

Bestio li estas. Bestio. Ne eblas nek indas priskribi alie. Li konstante min plankenĵetas kaj krude piedbatas. Kun elano. Mi ruliĝas dolore. Hipokrita li estas ankaŭ: li foje min prenas ambaŭmane, kisas, kvazaŭ ame – sed min denove sternas por pli sovaĝe frapi. Mia korpo kontuziĝas de l' draŝado, sed li ignoras. Eĉ mia ronda ventro ne detenas lin: li fajfas pri la sekvoj. Tretas ventron, dorson, flankojn – ĉie. Kia homo faras tion!? Kian sadisman ĝuon li ĉerpas!? Infera vivo. Eterna mizero, neeltenebla, neeskapebla...

Ĉu tio estas la kalvario de mistraktata virino?

Aŭ la ĉiusemajna brutalajo kontraŭ futbalpilko?

Decidu.

La stranga butikumo

Mi malamas butikumi! Tamen mi ne povas ignori la insistan peton de mia edzino iri aĉeti necesajojn por la bebo: kaĉopulvoron, lakton, vandojn... Sence! Krome hodiaŭ, sabato, tiom plenas je klientoj la vendejoj... kaj mi havas amason da propraj fendaĵoj, eĉ se nur por ĝui la vivon! Promeni tra la parko, spekti futbalmatĉon, bierumi kun amikoj... ellegi mian libron! Ja eblas trovi sufiĉajn kialojn por plu...

Nu bone, mi ja komprenas, ke oni devas fari tiujn aĉetojn. Mi faros ilin.

Sed iam mi devos kolekti mian kuraĝon kaj igi ŝin akcepti, ke ĝi mortis.

Oron similas

“Ĉu tio estas ĉio?”, mi demandis.

La ĉerko restis silenta.

Rakonto en tri minutoj

Mi havas tri minutojn por verki rakonton! Rapide, rapide! Kion mi pritraktu? Amon? Bestojn? Monon? Misterojn? Kial ne detektivromanon? Rapidege, la tempo fuĝas, forpasas, mi vidas la horon formiĝi! Ideoj mankas; venu, ideoj, mi petas vin, mi dependas de vi! Bonvolu! Nur kvardek sekundoj! Kion, kion? Dek naŭ, mi ne scias, ok, ha, mi ekhavas ideon, finfine!

Pasis la tri minutoj.

Sia klubo

Antaŭ kelkaj tagoj mi partoprenis kluban kunsidon.

- La membroj devas pagi iliajn kotizojn! – tondris la prezidanto.
- Jes, kaj ili ĝustatempe sciigu ŝanĝojn de iliaj kontaktinformoj! – furiozis la vicprezidanto.
- Sia regularo ne ĝuas respekton! – ofendiĝis la subprezidanto.
- En ĝia agado la klubo ne rikoltas multan sukceson... – mornis la duonprezidanto.
- Tio okazas, ĉar ĝi malatentas ĝiajn devojn! – ĝeniĝis la kromprezidanto.
- Sufiĉas! – ordonis la ĉefprezidanto –. Nun la sekretario prezentu lian raporton!

Mi ekstaris:

- Mi amas “sia”, neelĉerpeblan fonton de ĝojo kaj amuzo. Dankon, Zamenhof.

Sola

La rigardo estis pasia, danĝera.

– Mensogu al mi: diru “mi amas vin”.

– Mi amas vin.

– “Mi ne povas vivi sen vi”.

– Mi ne povas vivi sen vi.

La rigardo iĝis bestia, sovaĝa.

– Kaj ne forgesu ĉion tion –li elsiblis tra kunpremitaj dentoj, memorante–.
Alie...

La minaco floris en la aero. Li eklavis la manojn, malpurajn kaj ankoraŭ
gluiĝemajn.

La spegulaĵo decidis silenti.

Aliaj malpli prudentis.

Aŭdinte jelpon, li turniĝis.

– Mi devas tratanĉi la gorgon al tiu hundo –li grincigis la dentojn–. Alie...

La rigardo turniĝis kaverna, vakua.

La spegulaĵo delonge restis muta. Saĝe.

La hundo plu jelpis, fosante.

Taglibro

Malago, la 5an de aŭgusto 1984

Hodiaŭ nova familio enhejmiĝis fronte al ni. Ĝi konsistas el la geedzoj kaj filino. Bela. Tre, tre bela. Ĉu mi enamiĝis al ŝi, mi ne scias. Sed estas io... io en ŝi, kio ne plaĉas al mi.

Malago, la 6an

La patrino venis viziti nin por interkonatiĝo. Ŝin akompanis la filino. Berta, ŝi nomiĝas. Tre afable iŝi kondukis. Iŝi bedaŭris, ke la edzo ne povas ĉeesti. Dum la tuta tempo mi rimarkis la bluajn okulojn de Berta alnajtaj al mi – kaj miajn fiksojn sur ŝi. Mi timis.

Malago, la 8an

Ĉi-matene ni hazarde renkontiĝis sur la ŝtuparo, gesolaj. Ŝi ridetis al mi kaj faris plurajn demandojn pri la gimnazio. Mi ne povis eviti forte alrideti ŝin kaj respondi la demandojn. Mi brute enamiĝis al ŝi.

Malago, la 10an

Dank' al nova „hazarda” renkontiĝo ŝi proponis al mi ŝin kompanii al filmoprezentado. Malgraŭ la arda konsilo de mia menso, ke mi ne akceptu, la koro venkis. Vespere ni spektis „Fluge al la vent”. Mi deziregis ŝtelkisi ŝin. Mi min tenis.

Malago, la 13an

Je la deka mi sidis hejme sola legante libron. Oni sonoris. Berta. Ŝi ridete, kiel ĉiam, elpetis helpon por ripari mi ne scias kian aparaton. Mi transiris ŝian domon, kiu vakis je personoj. Mi ne plu min tenis, kisetis ŝin, kisis, kisadis. Ŝi kisvoris min. Ŝi certigis, ke neniŭ venos. Ni enpaŝis la ĉambron de ŝiaj gepatroj. Sur ilia lito ni amoris nin.

Malago, la 14an

Mi ege malsaniĝis. Mi vomemas. Panjo vokis kuraciston, kiu diagnozis, ke mi malvarmumas. Ordonis multan ripozon kaj rekomendis varmon. Bone mi scias, ke ne pri kataro temas.

Malago, la 16an

Miaj ungoj ekkreskegis. Rapidege, nenormale. Nur mi perceptis. Ekde nia ago mi ne revidis Bertan.

Malago, la 18an

Mi suferas elturmentajn koŝmarojn, forte ŝvitas nokte. Mia liva brako ete ekgangreniĝis. Panjo ankoraŭ ne rimarkis. Prefere.

Malago, la 20an

Mi ellitiĝis pli forta. La brako resaniĝis. Nul plia koŝmaro. Mi elvenis el la hejmo kaj trovis Bertan atendanta min. Ŝi invitis en sian loĝejon. Mi eniris. Terure! Tie staris... tie staris... Ĝi.

Malago, la 21an

Mia facio ekvioletiĝis de naŭziĝo. Miaj gepatroj ekzorgegis pri mi. Mi insistis, ke transiro al nova domo, al nova urbo, sanige efikos sur min. Post konsiliĝo kun la doktoro, paĉjo petis en la oficejo ŝanĝon de la labordestino. Oni akceptis.

Madrido, la 31an

Nova domo, nova urbo. Ne plu rememoroj pri la paseo. Mi tamen scias, ke io restis al mi el Malago: la neforviŝebla hororo, ke iam mi povus revidi Ĝin. Malgraŭ ĉio, vivo trankvila, iel feliĉa.

Madrido, la 1an de septembro

Hodiaŭ... no-... nova familio... enhejmiĝis... fronte... al ni.
Ĝi... ĝi konsistas el... el la ge-... geedzoj... kaj... kaj... ... filino.

Certe

Talbip flugis super la vulkanoza tero en plena aktivo. Retroa rigardoĵeto sufiĉis por lin konvinki, ke la tri pterodaktiloj ne ĉesigis la ĉasadon. Sub li, sur la grundo, la akregaj dentoj de tiranosaŭro eldiris mortoverdikton. Kaj Talbip pli kaj pli laciĝis. La arĥeopterigoj, pli rapidmovaj ol la grandaj flugilhavaj saŭroj, servis kiel montriloj de la direktoŝanĝoj de Talbip. Ĉi tiu, jam ellaciĝinte, decidis provi riskoplenan manovron: subitan sobiĝon al arbofoliaro. Kaj tiel li agis. Li preskaŭ mortiĝis, sed povis sin kroĉi al aro da branĉoj, kio malebligis lian kolizion kontraŭ la grundo. Alĉiela rigardo ebligis kontroli la arĥeopterigojn transflugi super la arbo, misorientitajn, kaj iom poste ankaŭ la pterodaktilojn. Almenaŭ momenta liberiĝo! Li neniam imagis, ke la plenumo de la misio tiom danĝeros. Li ne povas elspezi tempon senutile. Zorge li sobgrimpis la arbon, ĝis liaj piedoj eniĝis la humon. Du paŝoj kaj deposta bleko. Ne bezonis Talbip turni la kapon, eksperta konanto, li sciis, ke li iĝos la predo de gardanta dinoterio, se liaj kruroj ne ekfunkcios plej glate. Tra la kamparo sagrapide li sin pafis, sekvata kelkdistance de la bestio. Li ne timis ĝin, li ja multe pli rapidas, sed ĝia stulta blekado povus tiri la atenton de danĝeraj aliaj

animaloj. Kio efektive okazis. Smilodono en la ĉirkaŭaĵo aŭdis la helpkriojn de la dinoterio kaj komencis kuradon ale al ĝi. Okulangule Talbip vidis la rapidegan tigron proksimiĝanta. La kolharoj hirtiĝis. Li provis flugi, sed la iloj ne moviĝis. Li pli akcelis la kuradon, kio fine distigis lin de la dinoterio, tamen ne de la tigo. Ĝi ekhaltis por heroldi pervente helpalvokon. Talbip konsciis, ke se pli da tigroj aŭdos ĝin, li havos nenian ŝancon. Kaj kortranĉe kovris la sunradiojn roto da pterodaktiloj, kaj el proksima arbaro kurelsaltis muĝante tuta trupo da smilodonoj, kiuj lin puŝis al montoĉeno. Talbip ŝrumpis, lin ne plu pelis la devo plenumi la mision. Li tamen kuris, galopis, reprovis flugi: sensukcese. La pterodaktiloj vidkaptis lin kaj ekigis rondflugi super li. Dinosauroj aperis dekstre, barante lian fuĝovojon tra tie. La krifoj de la smilodonoj balais la Talbipajn piedspurojn. Li atingis la montoĉenon, senspire, anhele, kaj ekgrimpis. Pterodaktilo descendis al li kaj lin tuŝis per la flugilo, faligante lin. Sur la polvo li ruliĝis, stultigite tuj stariĝis kaj nebulvide plukuris. Kavo en la monto! En ĝin li sin ĵetis, transkapiĝis kaj per la lanco repuŝis la unuan tigron, kiu pretis sin enpafi post lin. Li venkis ĉe tiu unua atakprovo, sed la obskura maso de brontosauro proksimiĝanta, detruonta krure tiun fendon, desperigis lin. La tigra muĝado, la pterodaktila kriĉado centobliĝis de ĝojo, kapturnigante Talbipon. Nenia eliro, nenia savŝanco...

* * *

- Kiel vi pluigus ĉi rakonton?
- Mi ne scias.
- Kiel vi supozas, ke ĝi finiĝos?
- Ke la brontosauro krurpremos la kavon, do Talbipon. Ĉu mi eraras?

- Jes... kaj ne.
- Ha, jen respondo el tiuj, kiujn mi amas. Ĉu li elsaviĝos?
- Elsaviĝos? Jes... kaj ne.
- Bonege, bonege! Mi jam scivolegas pri la fino!
- Ankaŭ mi. Ĝin mi verkos iam. Certe.

Fantomnokto

– Mi vidis lin, mi vidis lin! – histerias mia fratino.

Mi algapas ŝin. Mi trovas min devigata ŝin vangofrapi por silentigi kaj trankviligi ŝin. Dufoje.

– Vi vidis NENIUN! Ni jam priparolis la aferon: fantomoj ne ekzistas. Diru do: kie precize vi “vidis” lin?

– Tie, malantaŭ la pordo – ŝi fingromontras kaj tremas.

Vento muĝas obtuze.

Mi fermas la pordon, remalfermas ĝin.

– Jen: ombroj, niaj propraj ombroj, videblas tie, aŭ ia aera fluo skuis la pendantan tukon, aŭ la lumo respeguliĝas kaprice. Ĉi tie en la banĉambro la speguloj facile kreas tiajn efektojn. Mi iom fermas nun la pordon, denove malfermas... Jes, ankaŭ mi povus havi la impreson vidi homon tie. Sed NE ESTAS! FANTOMOJ NE EKZISTAS! – mi ekkoleras.

Ŝi silentas, tamen aldonas:

– Ne estas la unua fojo, mi jam antaŭe...

– Jes, ankaŭ al mi li mankas! Ankaŭ mi bedaŭras la morton de nia patro kaj ankaŭ mi estas detruita! Sed ni *ne* povas juĝi ĉiun ombron li... Tio neniel bonfaras al ni, tute ne. Al neniu el ni.

Tondro resonas eĥe.

Ŝi hezitas, esploras silente, brakumas min.

– Mi iros al mia ĉambro. Sendube vi pravas, sed...

La ceteraj vortoj restas en la aero. Ŝi eliras el la banĉambro. Paŝas peze tra la koridoro.

Mi skuas la kapon senkomprene. Kiel aferoj povas tiom misi?

Mi turnas la kapon. Rigardas malantaŭ la pordon. Kuntiras la brovojn. Ĝenita.

– Bonvolu kaŝi vin pli bone, damne, paĉjo!

La nenio malantaŭ la pordo sin kaŝas pli bone.

Gingis-Hano

— Mongoloj! Jen vi ĵus ĉeestis mem la plej grandan venkon de nia popolo super alia, super la Ĥina Imperio Kin. Neniam antaŭe en la vivo de nia gento okazis tia ega sukceso, kia ĉi tiu. Tio estas klara pruvo, ke ja Dio volas oferi al ni la ordonpovon super la Tuta Mondo. Ni pluiros, mongoloj, ni pluiros, suden, norden kaj ŭesten, ĝis la Granda Maro. Ni submetos ĉiujn aliajn popolojn, ilin iĝos niaj sklavoj, kaj ni ŝanĝiĝos en la reĝojn de la universo, eterne priservotajn de ili. Sed, tuj kiam prezentigos pliaj ŝancoj por konkero, la mongolo zonos al si la glavon kaj surĉevaliĝos, kaj rajdos disvastigi la mongolan imperion tien, preteren, transen. La rulondon mongolan nenio haltigos, ĉar Dio mem nin favoras, kaj foruraganos ĉian provon de kontraŭstaro al ni. Nur la mongoloj ekzistos, monton nedetruieblan konsistigos. La mongola regno atingos tiajn alton kaj grandiozon, kiajn niaj prauloj eĉ ne suspektis. Kaj supre, super ĉio, sur la pinto de la monto, estante mem tiu pinto, Mi. Unu sola suno sur la ĉielo; unu sola ĥano sur la tero. Mia girfalko tranĉe boros iliajn sensignifajn flagaĉojn kaj traos ilian teron, kiu iĝos nia post ĝia paso. Mongoloj, aklamu la estron, al kiu vi ŝuldas viajn venkegojn! Mongoloj, aklamu MIN!!

Vic' al la eksplodo de freneza ĝojo el dek mil gorgoj, alia voĉo superbruis la parolantan.

– Karlo, jam pretas la tagmanĝo! Venu tuj!

Kun rezignacia gesto la dektrijarulo, ĵetante lastan iom amaran rigardon al siaj fantomaj hordoj, saltis de la muro kaj sin nevole pelis al la domo.